

*De 10 tekst die ik gelezen heb wellicht in 1937*

## MALLONGA HISTORIO DE ESPERANTO

La kreinto de la lingvo Esperanto estas Doktoro Zamenhof, kuracisto, kiu mortis en Varsovio, la ĉefurbo de Polujo. Li naskiĝis en Bjalostoko, jentempe malgranda urbo rusa, kies loĝantoj kaj urbanoj parolis multajn malsamajn lingvojn. Pro tio la Bjalostokanoj ne komprenis sin reciproke kaj tio kaŭzis multajn embarasojn.

La juna Zamenhof estis trafita de tiu malfeliĉo kaj multe pensis pri la plej bona maniero por malaperigi ĝin. Li do alvenis al la konkludo, ke liaj samurbanoj estis malamikaj nur tial, ke ili ne komprenis sin reciproke. La lingvo internacia kaj artefarita estas do kreita de la juna Zamenhof por homama celo.

Dum longaj jaroj Zamenhof laboris pri la farado de lingvo artefarita, post kiam li konvinkiĝis, ke nek lingvo mortinta kiel la latina, nek lingvo vivanta kiel la franca aŭ la angla povas taŭgi por ĝenerala uzado.

Jam en la jaro 1878 la lingvo internacia estis teorie preta sed saĝe Zamenhof ne volis ĝin publikigi antaŭ praktika provo. Li do tute sola, dum ok jaroj, provis praktike sian lingvon kaj ĉiam plibonigis ĝin. Oni povas legi en unu libro el lia verkaro lian belan leteron, en kiu li rakontas, kiel li konstruis sian lingvon. Fine en la jaro 1887 li publikigis la kvar unuajn librojn esperantajn, france, ruse, angle kaj germane verkitajn. En la tempo kiam aperis Esperanto, la lingvo Volapük bruegis. La bezono de lingvo helpa estis tiel granda, ke kelkaj homoj, kiuj volis povi paroli kun anoj de iu ajn lando, lernis Volapük'on, malgraŭ ke ĝi estis malbela, neparlebla kaj malfacila. Sed tiu ridiga lingvo, vera parodio de lingvo, ne povis longe daŭri. Ĝiaj partianoj eĉ plej fervoraj konstatis baldaŭ, ke tiu ombro de lingvo bezonis plibonigojn kaj malpaco okazis inter ili, ĉar ili ne povis unuiĝi pri la ŝanĝoj fareblaj aŭ farindaj. Tial Volapük mortis sed ĝia malsukceso tre malutilis por la ideo mem de lingvo artefarita. Multaj kredis, ke tiu malprospero estis nedisputebla pruvo, ke farado de lingvo estas neebla kaj utopia.

Esperanto eniris do malfacilan vojon plenan de antaŭjuĝoj kaj doktoro Zamenhof devis longe batali por venki la kontraŭstrantojn. Malriĉa, senpova li elspezis sian tutan havon por

la sukceso de sia ideo kaj nur post longaj jaroj da batalado, post ruiniĝo, kiam li komencis malesperi, la sukceso neantendata alvenis.

La unuaj esperantistoj estis precipe rusoj, svedoj kaj kelkaj germanoj. Sed kiel oni scias, la fondo de societoj en Ruslando estis kompreneble malfacila kaj la propagandado de novaj ideoj estis tre malhelpata de la cara polico. En 1889 aperis la unua ĵurnalo redaktita esperante. Ĝi estis presata en Germanujo, sed preskaŭ ĉiuj abonintoj estis rusoj. Tiu gazeto daŭris nur dum ses jaroj ĝis 1895. Tiam, ĉar la eminenta verkisto Leono Tolstoj verkis artikolojn en tiu gazeto, la regnestroj de Rusujo malpermesis ĝian eniron en tiu lando.

La gazeto mortis kaj la propagando haltis. Nova ĵurnalo nomita 'Lingvo Internacia' aperis en Svedujo el presejo de la urbo Upsala. Ĝi subtenis la malfacilan progresadon de la lingvo. En la jaro 1898 fondiĝis la 'Societo franca por propagando de Esperanto' sed post du jaroj da ekzisto ĝi nur kalkulis tricent anojn, kies apenaŭ duono loĝis en Francujo. Tiu movado franca atingis aliajn landojn. La malnovaj amikoj rusaj, svedaj, germanaj, bulgaraj, aŭstraj kaj hungaraj vekigis kaj granda puŝo naskiĝis unue en Anglujo kaj poste en ĉiuj aliaj landoj. Fine okazis dum 1905 en Boulogne-sur-Mer kun granda sukceso la unua internacia kongreso, kie kunvenis kelkaj centoj da adeptoj kaj kiu provis publike por la unua fojo la taŭgecon de la lingvo por ĝia celo. De tiu epoko kunvenas ĉiujare kun sama sukceso en malsamaj landoj novaj kongresoj, inter aliaj en Dresden, germana urbo, en Barcelona, en Washington, usona ĉefurbo, en la jaro 1911 en Antverpeno, kie estis 2107 partoprenantoj. La oka kongreso okazis en Krakow en 1912... ktp. La lasta antaŭmilita kongreso denove haviĝis en Antverpeno en la jaro 1938 kun multe da sukceso. Tiuj internaciaj kongresoj vekigas ĉie intereson kaj la progresoj de Esperanto tra la mondo estas tiel grandaj, ke neniu povas dubi pri la certa triumfo fina de la lingvo de Doktoro Zamenhof.

**ĈION PER AMO, NENION PER FORTO !**

*G. Peperstraete, Kastertstraat 14, Rekkem (antaŭ 1948)*